

# Gazetaraj Komunikoj de UEA

N-ro 1225

2025-04-03

---

## **110-A UK, BRNO: INTERNACIA KONGRESA UNIVERSITATO KAJ INVITO PROPONI POR PLIAJ SCIENCAJ EVENTOJ**

Ĉi-jare la oferto responde al la invito de UEA por la Internacia Kongresa Universitato (IKU) estis la plej abunda de post la pandemio. La IKU-ĵurio (Fiedler, Goodall, Maitzen, Vergara, Wen kaj Wandel) multe laboris por pretigi kaj ĝustatempe prezenti tiun-ĉi raporton. Aparte kontentiga estas la granda nombro de altnivelaj proponoj pluaj el personoj kiuj estas novaj por IKU. Cetere menciindas la signifa parto de virinoj kaj du afrikanoj.

El la ricevitaj proponoj la komisiono rekomendis kaj la estraro de UEA aprobis entute 17 prelegojn: 3 kursoj de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS), 6 IKU-prelegoj kaj 8 prelegoj por la Scienca Kafejo (SK):

AIS: Bebenina, Koutny - Kolka, Wandel

IKU: Barandovska, Jacobsen, Lindsted, Luheka, Niyukuri, Planchon

SK: Alebić-Juretić, Bormann, Fernández, Fontaine, Gruner, Guerra, Jackson.

La detaloj aperas en la aldonita tabelo, kaj la resumoj en la IKU-paĝo: <https://uea.org/kongresoj/universitato>. La temoj varias de lingvistiko kaj spacteknologio ĝis historio kaj arkitekturo. Apud konataj kaj ŝatataj prelegantoj kiel Koutny, Jacobsen kaj Bormann aperos multaj novaj (almenaŭ por IKU) tamen kompetentaj talentoj. La IKU-rektoro estas prof. Barandovská-Frank, deveninto de Brno, kiu ankaŭ prelegos pri temo ligita al la kongresurbo. Por ĝui la abundan sciencon programon, aliĝu al la 110-a Universala Kongreso de Esperanto, kun rabato ĝis la 30.06.2025: <https://uk.esperanto.net/2025/>

nomo familia	nomo persona	temo	AIS/SK	titolo
Bebenina	Ekaterina	Matematiko	AIS	La iluzio de precizeco: kompreni kaj akcepti la ambiguecon de nombrinformoj
Koutny, Kolka	Ilona, Milan	Lingvistiko	AIS	Multlingva reta temvortaro helpata per artefarita intelekto
Wandel	Amri	Spacteknologio	AIS	La teknologio de Spacvojaĝado kaj esplorado: de la Internacia Spacstacio ĝis James Webb
Barandovská-Frank	Věra	Historio	IKU	Antonín Bartoněk: el Brno al misteroj de la pragreka civilizo
Jacobsen	Jesper	Arkitekturo	IKU	Pri musoj kaj homoj: Behaviorismo en brutalisma arkitekturo
Lindsted	Jouko	Literaturo	IKU	La infanlibroj kiu sin turnis al plenkreskuloj
Luheka	Marcelin	Historio	IKU	La Konga Sendependeco kaj Historio de Kongo
Niyukuri	Gilbert	Medicino	IKU	Viruso Ebola
Planchon	Philippe	Lingvo/politiko	IKU	La revolucia vidpunkto de Jean-Jacques Rousseau pri lingvo kaj politiko
Alebić-Juretić	Ana	Kemio	SK	Lumo kaj poluado de atmosfero
Bormann	Thomas	Historio	SK	Burno kaj la Dua Mondmilito: knabeto savita de Auschwitz
Fernández Asensio	Rubén	Arkivistiko	SK	La Universala Deklaracio pri Arĥivo: inter arĥivistiko por esperantistoj kaj esperantismo por arĥivistoj
Fontaine	Joel	Fiziko	SK	Resonanco, kaj ĝiaj uzoj en la ĉiutaga vivo
Gruner	Horst	Daŭripovo	SK	Longdaŭrismo, ĉu amika, ĉu danĝera
Guerra Radsack	Patricia	Sociologio	SK	Virinoj kaj kriminaleco en Santa Luzia do Carangola fine de la 19-a jc
Hartmann	Felix	Planto-scienca	SK	Vegetaĵoj ne vegetas — Kiel plantoj sentas kaj moviĝas
Jackson	Judith	Biologio	SK	Gregor Johann Mendel (Řehoř Jan Mendel) (1822 - 1884)

Kiel ĉiujare, estos eldonita la IKU-libro kiu enhavas la tekstojn de ĉiuj prelegoj, inkluzive tiuj de la Scienca Kafejo kaj la Scienca Universitata Sesio okazonta dum BET.

### **SUS-oj dum BET kaj la Itala Kongreso kaj Premio Pirlot por la plej bona scienca libro**

Krom IKU okazos ĉi-somere tri aldonaj projektoj de AIS: du de la Scienca Universitata Sesio (SUS) kadre de la Baltiaj E-Tagoj (BET) en julio kaj de la Itala Kongreso en septembro. Prelegoj kaj kursoj akceptotaj por tiuj eventoj ricevos honorarion de AIS, samkiel senpagan aliĝon al la respektivaj kadraj eventoj. Proponojn bv. sendi al [amri@huji.ac.il](mailto:amri@huji.ac.il).

Dum la Burna UK estos disdonita la Premio Pirlot por la plej bona scienca libro aperinta en la lastaj jaroj. Proponojn bv. sendi al [amri@huji.ac.il](mailto:amri@huji.ac.il) ĝis junio. La premio estos 200/100/50 eŭroj por la unua/dua/tria loko respektive. La ĉi-jara konkurso por la plej bona scienca libro estas dediĉita al la memoro de Renato Corsetti, kiu servis kiel sekretario de la konkurso ekde 2017.